

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

101-a jaro • n-ro 1218 (10) • **Oktobro 2008**



Lee Chong-Yeong (1932-2008)



Vi trovos...

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 36);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,50.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org
TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

- 195 ... Malferme: Denove reprezentitaj en Ekonomia Forumo (Peter Baláž)
196 ... UEA aktivis en la Socia Forumo de UN
198 ... Montrealo kaj Roterdamo aktivigis la amerikan movademon
(Maritza Gutiérrez González)
199 ... KD „Esperanto“ en rekorda eldonkvanto kun pola ĵurnalo
(Peter Baláž)
200 ... Retrorigarde al la 93-a UK: Gratultelegramo de Princino Laurentien;
Nacia Vespero (Loes Demmendaal)
201 ... Libroj de la jaro (Claude Nourmont)
202 ... UEA premiis kaj subvenciis
203 ... Vegetaranoj lernis Esperanton (Francesco Maurelli)
204 ... Kotiztabelo de UEA por 2009
205 ... Lee Chong-Yeong (1932-2008)
206 ... Konferenco en Amsterdamo: La neceso reinventi Budapeŝton
(Federico Gobbo)
208 ... Nederlandaj lingvoj (II) (Nikola Rašić); Malferma Tago
209 ... Laste aperis
211 ... Oficiala informilo; UEA invitas prelegi en la Bjalistoka IKU-sesio
212 ... Tra la mondo: Niaj instruistoj konferencis (Isikawa Tiekō)
213 ... Sukcesa somera lernejo kun la unua *lernu!*-renkontiĝo
(Peter Baláž kaj Jevgenij Gaus)
214 ... Forpasoj

KOVRILPAGE: Sojle de la 93-a UK en Roterdamo forpasis en la aĝo de 76 jaroj
prof. d-ro Lee Chong-Yeong, eksa prezidanto kaj Honora Membro de UEA
(legu pli sur la p. 205).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road,
IN-700108 Kolkata, Barato; ☎ +91 33 2359
7731; ✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): D-ro inĝ.
Ranieri Clerici, Via Conte Verde 66,
IT-00185 Roma, Italio; ☎ +39 333 255 19 04,
☎ +39 06 97 600 326;
✉ ranieri.clerici@tin.it.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino
Barbara Pietrzak, Ul. Międzynarodowa
38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa,

Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h],
☎ +48 6000 51 425; ✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes
Demmendaal, Duikerlaan 160, NL-2903 AC
Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31
10 213 33 20; ✉ L.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori Jasuo,
10-27 Simosinden-mati 10-27, JP-371-0822
Maebasi-si, Gunma-ken, Japanio;
☎/✉ +81 27 253 2524;
✉ hori-zonto@water.sanmet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José Antonio
Vergara, Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio;
☎ +56 65 256660 [h], +56 65 344606 [of], ✉
+56 994521017;
✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Gregor Hinker.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

Denove reprezentitaj en Ekonomia Forumo

Jam la trian fojon ni estis reprezentitaj en la prestiĝa Ekonomia Forumo en la pola banurbo Krynica, de la 10-a ĝis la 13-a de septembro 2008. Denove la oficiala partnero por la forumo estis EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), kiu prizorgis propran podian diskuton kaj aldone informstandon kun riĉaj informiloj en tri oficialaj lingvoj de la forumo: la pola, angla kaj rusa.

La ĉeftemo de la podia diskuto estis *Ĉu unuiĝintaj en diverseco? Lingvolernado kaj eŭropa identeco*. Gvidanto de la diskuto estis Barbara Pietrzak, kiu nome de UEA enkondukis la temon kaj kontribuis per gravaj informoj rilataj al Esperanto kaj ĝiaj propedeŭtika kaj identecoforma valoroj. Aliaj diskutantoj estis la EEU-estraranoj Zlatko Tišljär, Georgo Handzlik kaj Peter Baláž (ĉiuj kvar sur la foto).

La Forumo donas ankaŭ gravan kaj raran eblon diskuti kun gravaj personoj de politiko, ekonomio, diplomatio ktp. Tiel okazis ankaŭ ĉi-jare, kun relative bonaj rezultoj, ekzemple renkontiĝoj kaj interparoloj kun la eksa prezidento de Pollando Lech Wałęsa, aŭ la nuna vicĉefministro de Slovakio Dušan Čaplovič.

Feliĉa koincido kaŭzis, ke la DVD „Esperanto“ (legu sur la p. 199), kreita surbaze de la mendo de la urbo Bjalistoko, aperis en *Gazeta Wyborcza* ĝuste dum la unua tago de la Ekonomia Forumo en Krynica kaj tiel eĉ plifortigis la efikon de la informado dum tiu ĉi aranĝo. La informado pri Esperanto estis ankaŭ ĉi-foje bunta kaj sukcesa – ĝojigas krome la fakto, ke efektive ne aŭdiĝis kontraŭstaroj rilate Esperanton. Multaj homoj taksis la ideon interesa, volis aŭdi *Kial ni lernu tiun lingvon?* aŭ *Ĉu ĝi vere estas tiom facila por lerni?* Ŝajne degelas la kontraŭstaro al la internacia lingvo.

La aranĝon ĉi-jare kunfinancis tri organizaĵoj: EEU, UEA kaj ESF. Por povi ĉeesti la aranĝon ni ŝuldas dankon al la prezidantino de PEA Halina Komar, kiu danke al siaj kontaktoj ebligis la partoprenon. Apartan dankon meritas ankaŭ la volontuloj de PEJ (Pola Esperanto-Junularo), jam regulaj deĵorantoj en la Esperanto-stando.

La EEU-estraro esperas daŭrigi tiun ĉi sukcesan prezentadon de Esperanto al ekstera publiko kaj jam nun komencas elekti temon por la venontjara forumo, kaj la podiajn diskutontojn.

Peter Baláž



UEA aktivis en la Socia Forumo de UN

UEA ĉeestis aktive en la tritaga Socia Forumo de la Homrajta Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo (1-3 septembro 2008), kiu traktis la malriĉecon en la mondo.

Kiel reprezentantoj de UEA partoprenis tuttempe Charmian Common kaj Stefano Keller, kaj en la unua tago Cesco Reale. En du okazoj reprezentanto de UEA intervenis alparolante la Forumon.

Post trastudo de la diskuttemoj kaj la sperto dum la unua tago, la delegitoj de UEA decidis interveni en la konkluda periodo. Krom la necesaj informoj pri la proceduro, ili ricevis tre utilajn konsilojn kaj sugestojn de Francoise Mandallaz, kunlaborantino de la ĉefo de la UN-oficejo por ligoj kun NRO-j, Ricardo Espinosa, kiu prelegis en la aprila Datrevena Simpozio de UEA pri lingvaj homaj rajtoj. „Kun s-ino Mandallaz ni jam havis agrablajn kontaktojn dum la organizado de la Simpozio. Ankaŭ ĉi-foje ŝi helpis nin, kvazaŭ ŝi deĵorus tie kiel konsilanto de la esperantistaj intervenantoj“, diras Stefano Keller.

Laŭ Keller, pro strategiaj kialoj la reprezentantoj de UEA modifis sian planon kaj anoncis sian unuan alparolon jam por la dua tago kadre de la diskuto post la parolado de Anna Biondi el la Internacia Sindikata Konfederacio. Same kiel Espinosa, ankaŭ ŝi estis konata al la UEA-delegacio kiel preleginto en la aprila Simpozio en sia rolo de vicprezidanto de la Ĝeneva NRO-komunumo.

Keller prezentis proponon de UEA pri kunlaboro por tradukado kaj disvastigo de la konkluda dokumento de la Forumo en Esperanto kaj kelkaj lingvoj aliaj ol la ses oficialaj lingvoj de UN. Post lia interveno Anna Biondi anoncis publike, ke ŝi jam havas kun si informilojn por doni al „miaj esperantistaj

amikoj“ por la tradukado. La duan fojon UEA intervenis en la konkluda parto, kiam Keller komencis sian paroladon per danko al la interpretistoj pro ilia signifa kaj granda laboro kaj finis memorigante pri la esperantista propono al la Forumo. Ambaŭfoje la prezidanto de la Forumo, Mousa Burayzat, konstanta reprezentanto de Jordanio ĉe UN en Ĝenevo, reagis tre pozitive. Dum paŭzo li kontente malkovris, tra la retejo de la UEA-komisiono pri Meza Oriento kaj Norda Afriko, ke la 1-a Mezorianta Kunveno Esperantista meze de aprilo okazis ĝuste en lia lando.

Ankaŭ aliaj ĉeestantoj interesiĝis pri Esperanto post aŭdo pri ĝi kaj prenis informilojn ekspoziciatajn ĉe la enirejo de la salono. Stefano Keller kaj Charmian Common rakontas: „Ni rimarkis, ke nia duopa ĉeesto havis pozitivan efikon, ĉar oficistoj de UN kaj aliaj forumanoj aŭdis nin paroli inter ni en Esperanto kaj tiel povis konvinkiĝi, ke ĝi estas vera lingvo.“

La Forumo estis bona okazo por ligi novajn kontaktojn kaj plifortigi tiujn kun prelegintoj de la Datrevena Simpozio, el kiuj ĉeestis, krom Anna Biondi, ankaŭ ŝia antaŭulo kiel prezidanto de la NRO-komunumo, Renate Bloem, kaj ambasadoro Ronald Barnes el Alasko. Reprezentantoj de ŝtatoj kaj de NRO-j dum la tri tagoj kelkfoje aŭdis pri Esperanto. Interalie, antaŭ ĉiu diskutperiodo la prezidanto anoncis, kiuj intervenos, kaj rediris la nomon de la organizaĵo antaŭ ties ekparolo. La lastan tagon eĉ surtabla anglalingva ŝildo anoncis la apartenon de Charmian Common kaj Stefano Keller, sidantaj malantaŭ ĝi, al Universala Esperanto-Asocio.

La tekstoj de la esperantistaj intervenoj estos senditaj al la organizintoj de la Forumo en la oficialaj UN-lingvoj. Ekzistas ankaŭ esperanta versio, kiu servas kiel bazo por plutradukoj alilingven. La originala franca teksto de la unua alparolo estas jam rete legebla ĉe <http://uri.fi/LC/>. La dua interveno (kies teksto same aperos en la reto), malpli longa kaj improvizita, estas aŭskultebla rete ĉe <http://uri.fi/YN/>. La alilingvaj versioj kaj ĉiuj dokumentoj rilataj al la partopreno de UEA en la Socia Forumo 2008 estos publikigitaj en la retejo de la Agado por Lingvaj Rajtoj (ALR) ĉe <http://www.lingvaj-rajtoj.org/eventoj/>.



Stefano Keller kun Verena Graf, reprezentantino de EBLUL, Eŭropa Buroo de Malpli Uzataj Lingvoj, kaj Aureli Argemí i Roca, Prezidanto de CIEMEN, Internacia Centro por Etnaj Minoritatoj kaj Nacioj, kerno de laborgrupo pri lingvaj rajtoj, dum la laborkunsido ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo.

UEA Atentigis UN pri lingvaj rajtoj

Universala Esperanto-Asocio, kiu ĵus reprezentigis en la Socia Forumo de la Homrajta Konsilio de UN en Ĝenevo, estis invitita prezenti al la Konsilio deklaron pri sia starpunkto en afero, kiun ĝi trovas grava. UEA havas la rajton sciigi siajn starpunktojn ankaŭ al tiu grava organo de Unuiĝintaj Nacioj pro sia oficiala statuso de Neregistara Organizaĵo en specialaj konsultaj rilatoj kun la monda organizaĵo. La aktuala deklaro de UEA temas pri lingvaj homaj rajtoj kaj estis submetita al la 9-a sesio de la Homrajta Konsilio en Ĝenevo (8-26 septembro) en la angla, franca kaj hispana lingvoj. Ĉi-sube sekvas ĝia Esperanta versio.

La starpunkto de UEA pri lingvaj rajtoj

Lingvaj rajtoj estas esencaj por ĉiu popolo, sendepende de la grandeco de ties membraro. Tiuj ĉi rajtoj devas esti protektataj precipe por malgrandaj grupoj. Universala Esperanto-Asocio subtenas minoritatajn lingvojn de pli ol 100 jaroj.

La rajto de infanoj lerni sian gepatran lingvon kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian gepatran lingvon, ne nur estas grava por ilia kulturo; ĝi estas fundamenta por ilia psika evoluo. Pluraj larĝskalaj studoj en multaj diversaj landoj demonstris, ke se indiĝenaj kaj minoritataj infanoj estas edukataj ĉefe uzante sian gepatran lingvon kiel lingvon de la instruado dum la unuaj 6-8 jaroj (kun samtempa, bona instruado de la reganta lingvo kiel dua lingvo, fare de dulingvaj instruistoj), iliaj ĝeneralaj lern-atingoj estas pli bonaj. Krome, ili lernas la regantan lingvon pli bone ol se ilia instruado okazus per la reganta lingvo. Se ili estas instruataj en la gepatra lingvo nur unu aŭ du jarojn kaj ili poste devas transiri al la uzo de la reganta lingvo, ili povas komence sukcesi relative bone, sed proksimume ekde la kvara lernoĵaro ilia progreso ekmalrapidiĝas kaj la diferenco inter ili kaj la infanoj parolantaj denaske la regantan lingvon plukreskas.

Gravas ankaŭ, ke la homoj kapablu komuniki je diversaj niveloj. UEA apogas lernadon de 2, 3 aŭ 4 lingvoj, laŭ la cirkonstancoj, t.e.

1. la gepatran lingvon,
2. la regionan lingvon, se ĝi estas malsama,
3. la nacian lingvon, se malsama ol la unuaj du,
4. internacian lingvon, kiu apartenas al neniuj nacio – nome Esperanton.

Esperantistoj scias, ke kiam multnacia grupo uzas unu neŭtralan, komunan lingvon, la kvalito de la komunikado estas eksterordinara. La fina celo de Esperanto estas antaŭenigi pacon inter popoloj igante la komunikadon pli facila kaj pli justa. Uzo de komuna lingvo evitigas situacion,



Mousa S. Burayzat, prezidanto de la Socia Forumo (organizita de la Homrajta Konsilio, 1-3 sept 2008), helpe de Stefano Keller (komisiito de UEA ĉe UN), malkovras la retan mondon de Esperanto kaj ekscias pri ekzisto de movadanoj en lia lando, Jordanio. Dum paŭzo de la kunsido ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo.

en kiu homoj uzantaj sian gepatran lingvon havas grandegan avantaĝon super la aliaj.

Ni dezirus ke Unuiĝintaj Nacioj pripensu tion ĉi koncerne siajn proprajn kunvenojn. La diferenco estas tre evidenta, kiam oni aŭdas delegitojn, kiuj sin esprimas en la angla, la franca aŭ la hispana, kaj por kiuj tiu ĉi estas ĉu la dua ĉu la tria lingvo. Kiam ekparolas iu uzanta sian gepatran lingvon, ofte la diferenco estas frapa – tio, kion tiu ĉi diras, havas multe pli da pezo kaj allogas la atenton multe pli ol parolanto uzanta fremdan lingvon.

Referenco: *Deklaro pri rajtoj de personoj apartenantaj al naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj minoritatoj*, adoptita de la Ĝenerala Asembleo, rezolucio 47/135, la 18-an de decembro 1992. (http://www.unhchr.ch/html/menu3/b/d_minori.htm)



Fotoj: Stefano Keller

Aurélien Neu, reprezentanto de Mauritania, ĉe UN en Ĝenevo, dum kunsida paŭzo de la Homrajta Konsilio, vige interesigas pri Esperanto kaj ricevas informilojn kaj klarigojn de Stefano Keller, kiu intervenis nome de UEA dum la konsilia debato.

Montrealo kaj Roterdamo aktivigis la amerikan movademon

Ĉi-jare la Amerika Komisiono de UEA revigligis sian aktivemon per du ĉefaj internaciaj eventoj, nome, la 7-a Tutamerika Kongreso de Esperanto kaj la 93-a UK, okazintaj en Montrealo kaj Roterdamo.

Por Montrealo aliĝis al la kongreso 222 homoj el 24 landoj, el ili 7 amerikaj landoj, nome Kanado, Usono, Meksiko, Kubo, Kostariko, Gvatemalo kaj Ĉilio, sed efektive partoprenis 193 kongresanoj.

Tamen la fakto, ke samtempe okazis la tutlanda kongreso de Esperanto-USA, donis unikajn okazon arigi sufiĉe grandan nombron da usonaj kaj kanadaj geesperantistoj, sed aliflanke sentiĝis manko de latinamerikanoj, kiel estis antaŭvidite.

La kongresa temo estis *Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diverseco por daŭripova evoluo en la Amerikoj*.

Dum la plurasocia malfermo, nome usona, kanada kaj tutamerika, alparolis la kongreson Phil Dorcas, Normand Fleury kaj Maritza Gutiérrez González. La kongreson salutis ankaŭ la UEA-estraranoj Hori Yasuo kaj José Antonio Vergara. Estis legaita la oficiala salutmesaĝo de la Brazila Esperanto-Kongreso, samtempe sesianta en tiu sudamerika lando. Ĝi konfirmis la inviton de BEL por okazigo de la 8a TAKE en Brazilo en kunordigo kun la Amerika Komisiono de UEA. La mesaĝon sendis la prezidanto de BEL José Passini.

La kongresa programo estis tre riĉenhava pro siaj prelegoj, forumoj, praktikadoj, kurso por komencantoj, laborkunsidoj de la Amerika Komisiono, bankedo, laborkunsidoj de Esperanto-USA kaj aliaj tre variaj programeroj. La vesperaj programoj same buntis per koncertoj de invititaj artistoj kebekiaj kaj esperantistaj, kiel JoMO el Francio kaj Julián Hernández Angulo el Kubo. Rimarkinda estis la fakto ke ĉi-foje la membroj de la Amerika Komisiono de UEA en granda plimulto havis

la okazon kunsidi plurfoje kaj plani estontajn agadojn, prezenti al la kongresanoj diversajn projektojn, interalie pri la agado ĉe lokaj kluboj, aparte en Usono, kies asocio konkretigis proponon pri subteno de la regiona agado, planoj pri venontjara trejna seminario en la centramerika regiono kaj aliaj projektoj, kiujn popaŝe entreprenos la komisiono.

Per konkreta deklaro aperigita en la retejo www.ameriko.org kaj aparte per kongresa rezolucio, nia komisiono esprimis sian dankon al ĉiuj kontribuintoj pro la sukcesa okazigo de la 7-a TAKE. Tuj poste kelkaj reprezentantoj de la komisiono vojaĝis al Roterdamo por partopreni en la 93-a UK kaj tie prezenti la agadon kaj planojn de la regiona movado.

Inter la plenumitaj taskoj de la komisiono estis partopreno en la Movada Foiro dum la interkona vespero, kie ni dividis tablon kun IEI kaj tie kelkaj aktivuloj deĵoris por informi pri la agado de la komisiono, disdonis invitilojn por partopreni la kunsidon pri Ameriko kaj informis interesitojn pri niaj estontaj planoj.

Alia grava momento estis la kunsido pri Ameriko okazanta dum la UK, kiun partoprenis proksimume 60 geesperantistoj el diversaj mondopartoj. Ili estis informitaj pri la okazigo de la 7-a TAKE en Kanado, pri la agadoj de la komisiono, la retejo, la projekto pri venontjara trejna seminario en Meksiko, pri planoj por estonta Amerika Oficejo, aktivigo de agadoj ĉe lokaj kluboj, k.a.

Sendube, la prioritato de nia komisiono estas plifortigi la rilatojn kaj kunlaboremajn inter landaj asocioj, kies movado estas vigla, forta kaj aktiva en nia regiono, kaj, aliflanke, subteni la agadon en landoj kun malforta movado, laŭeble kontribui al disvastigo de la lingvo en nia regiono kaj tre aparte en Centrameriko. Tiurilate multo farendas kaj ni konscias ke temas pri granda defio, kiu bezonas ĉies manojn.

Maritza Gutiérrez González

Kunordiganto de la Amerika Komisiono de UEA



KD „Esperanto” en rekorda eldonkvanto kun pola ĵurnalo

Rekordan kvanton de 364 000 ekzempleroj atingis eldono de la kompaktdisko *Esperanto* la 10-an de septembro en la pola ĵurnalo *Gazeta Wyborcza*. La disko estis aldonita al la gazeto kiel senpaga aldonajo (pagita de la urbo Bjalistoko) en la kompleta eldonkvanto de la ĵurnalo.

La diskon kreis la organizo E@I, surbaze de la mendo de la urbo Bjalistoko, kun kiu la 1-an de januaro 2008 estis subskribita oficiala kontrakto pri la pretigo de la KD.

Pluraj polaj esperantistoj aĉetadis dum la tago po 10-20 gazetojn kun la disko, celante disdoni ilin al siaj konatoj aŭ amikoj, kiel taŭgan kaj malmultekostan informilon pri Esperanto.

La ĉefa ideo de la disko estis krei informilon, kiu estu kvazaŭ komputila ludo – infomilo kapabla kapti la atenton kaj amuzi, sed samtempe instrui kaj doni gravajn informojn.

La disko ŝaltiĝas kiel desegnita mapo de elpensita, kvazaŭ fabela, virtuala Bjalistoko, kun pluraj konstruaĵoj, desegnitaj laŭ originaloj, reale troviĝantaj en la urbo (la suba bildo).



Sekve eblas promeni tra la urbo kaj viziti unuopajn konstruaĵojn, kie ĉiu havas sian apartan celon: lernejo, kinejo, muzikejo, E-muzeo, biblioteko... Post klako al la urbodomo aperas eĉ video-saluto de Tadeusz Truskolaski, la urbestro de Bjalistoko, kiu invitas la KD-uzantojn al la venontjara UK.

Ĉe la kreado de la disko helpis al E@I multaj esperantistoj, al kiuj E@I-teamo volas ankaŭ ĉi-maniere danki.

Estonte E@I planas krei similspecan multlingvan DVD-on kun simila celo, sed por tiu projekto estos necesaj helpo kaj kunlaboro de aliaj E-organizaĵoj kaj Landaj Asocioj. En la kazo de intereso pri tia disko bv. kontakti la estraron de E@I ĉe: estraro@ikso.net.

Peter Baláz

Gratulotelegramo de Princino Laurentien

Akceptu miajn elkorajn gratulojn
okaze de la 100-jara ekzisto
de Universala Esperanto-Asocio.

La 93-a Universala Kongreso de Esperanto
estu eksterordinare sukcesa evento!

Laurentien de Nederlando

*(La unua frazo de la mesaĝo
de la Princino estis skribita en Esperanto.)*



Nacia Vespero

La Nacia Vespero
malfermiĝis pere
de deklamado
(nederlandlingve)
fare de „aŭktoro“,
s-ro Jules Deelder,
membro de la
honora komitato
kaj „nokta
urbestro“
de Roterdamo.
Temis pri lia odo
al Roterdamo
(sur la sekva
paĝo).



la fama kariba muziktrupo BEM
(Brass Eternity Music)
Foto: Peter Hauser

Rotown Magic

Roterдам' – la ne filminda.
Tro maltrankvilas ĝia fon'.
Roterдам' – la senpasinta
sen fasadoj kun fronton'.

Roterдам' sen romantiko
tenas blagojn for de si
sen inklin' al poetiko
sen babil' severas ĝi.

Filmkamerojn ĝi mallogas
senpretende, sen graci'.
Kie blokon blok' apogas
en pala sun' rebrilas ĝi.

Roterдам' ne imageblas
kiel kino-iluzi'.
Roterdamo ne filmeblas.
Roterdamo estas ĝi.

(La tradukon de Wim Jansen legis Francisco Veuthey)

Poste sekvis kantoj fare de la korusoj Akordo kaj Malvo. Temis pri kantoj ekde la 16-a jarcento ĝis la 20-a jarcento. La tekstoj estis tradukitaj en Esperanton kaj aperis sur ekrano dum la kantado, tiel ke eblis facile sekvi ilin. Aŭdiĝis vario de batalkantoj, glorkantoj, mezepokaj kantoj kun pikantaj kaj nuntempaj tekstoj.

Antoinette Lammers dufoje pianludis diversajn pecojn de nederlandaj (foje roterdamaj) komponistoj, konatigante la kongresanojn kun la nuntempa nederlanda muziko de Willem Pijper, Louis van Dijk, Joop Stokkermans k.a.

Ziko van Dijk prezentis nuntempajn nederlandajn humuristojn/kabaredistojn. Kun foto en la fono, li legis iliajn tekstojn. Humuro diferencas de lando al lando. Per tiu ĉi programero la kongresanoj renkontiĝis kun la nederlanda.

Saskia Idzerda deklamis la poemon *Memore al Holando* de Hendrik Marsman:

Memore al Holando

Holando ... lando
de larĝaj riveroj
fluantaj lace
tra kampo ebena,
vicoj de poploj
sveltaj, gracilaj
tremantaj plumoj
ĉe horizonto serena,
kaj perditaj en
senfinaj spacoj
la farmejoj
disaj en la lando;

arbgrupoj, vilaĝoj,
turoj senpintaj,
preĝejoj kaj ulmoj
kaj nuda strando;
ĉielo malalta
kaj pro nebulo
nuance griza,
la suno pala;
kaj ĉie aŭdiĝas
la voĉo de l' akvo,
de ĉiu timata,
minaco fatala.

(Tradukis Julia Isbrucker)

La lasta ero estis la fama kariba muziktrupo BEM (Brass Eternity Music), kiu surprizis la kongresanojn per neatendita gaja tambura muziko (sur la foto). Ili ludis en kaj ekster la salono, tiel donante al la kongresanoj la ŝancon kundanci laŭ la muziko. Pli poste en la semajno ili gajnis la „Batalon de la tamburoj“, surstrata „batalo“ inter tamburgrupoj, okazanta la nokton antaŭ ol la Kariba Karnavalo pasis tra Roterdamo.

Loes Demmendaal

Libroj de la jaro

Espero,
Bero,
Voko, eĉ Impeto,
Stano,
Fonto
kaj Christian Rivière,
KAVA-PECH,
FEL, kaj FLP,

IEMW,
Libroteko Tokyo,
Mondial,
Skonpress,
LibroMondo,
Triade,
HEA,
kaj UEA.

Ne temas pri nepremiita poemo, sed pri dudeko da eldonistoj kiuj stafete prezentis siajn novajn produktojn dum la programero *Libroj de la Jaro*. Kion menci, inter la tre valoraj novaĵoj?



Se mi devus elekti premiotan triopon, kiel en la Belartaj Konkursoj, certe multaj protestus, ke mi unuavice menciis anglalingvan verkegon, enciklopedion de Esperanta literaturo en la angla: *Comise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*, kompilitan de Geoffrey Sutton. Temas pri unua siaspeca verko: ni ŝatus havi tian seriozan libron en

multaj lingvoj. *Bona Espero, idealo kaj realo* de Roman Dobrzyński estas fascina libro, kiu montras tra kiaj nefacilaj cirkonstancoj ge-Grattapaglia sukcesas pluvivigi la brazilan centron. Tute taŭge por la olimpika jaro aperis *Manlibro pri olimpikaj vortoj*, en 4 lingvoj.

Sed kiom da aliaj allogaj libroj: *Japana esearo, Raportoj el Japanio 11*, la pluaj lernolibroj de Stano, kaj multaj aliaj valoraj libroj... pri tio vi legis aŭ legos en „Laste aperis“.


Claude Nourmont



Fotoj: Stano, Marček

UEA honorigis, premiis kaj subvenciis

Dum la 93-a UK estis solene anoncitanj Honora Membro kaj ricevantoj de la movadaj diplomoj kaj premioj pro meritplenaj aktivaĵoj, kaj subvencio por ebligi estontan agadon.



Honora Membro, pro gravaj servoj al la tutmonda Esperanto-movado, estis laŭ la decido de la Komitato de UEA elektita Simo Milojević. Li naskiĝis la 14-an de decembro 1936 en Kunja Glavica, Trebinje (Hercegovino), Jugoslavio. Li esperantistiĝis fine de 1956. En la komenco de sia movada aktivado li estis sekretario de loka Esperanto-klubo, poste de

Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj de Jugoslavia Esperanto-Instituto. En 1963 li estis ĉefredaktoro de *Jugoslavia esperantisto*, poste de *La suda stelo* (1964, 1967-69). Kiel komisiito de UEA li restadis pli ol jaron (1960-61) en Hinda Unio kaj Nepalo por instrui Esperanton. Post sia transloĝiĝo al Nederlando Milojević redaktis la revuon *Kontakto* (1970-74). En 1974 li eklaboris en la Centra Oficejo de UEA, kiel vicdirektoro (1974-80) kaj redaktoro de *Esperanto* (1974-1984). De 1983 ĝis 1995 li estis ĝenerala direktoro de UEA. Li estis membro de la Akademio de Esperanto (1989-1998). En sia 60-a vivojaro, li decidis formeti ĉiujn movadajn funkciojn kaj labori kiel libroservisto kaj bibliotekisto en UEA, de 1996 ĝis la fino de 2002, kiam li pensiigis. Ekde la fino de 2007 li vivas en Trebinje (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino).



Premio Degučić, la „esperantista pacpremio”, starigita en 1987 per donaco de Oomoto, estis ĉi-jare aljuĝita al Renato Corsetti, unu el la plej elstaraj agantoj de UEA. La premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj. Distingante Corsetti la Estraro de UEA karakterizis lian agadon: „Por li

Esperanto estis ĉiam nedisigeble ligita al agado por pli bona mondo, por internacia amikeco, solidaro kaj paco. Antaŭenigi tiujn idealojn signifas al li antaŭenigi Esperanton, kaj tute aparte, disvastigi ĝin precipe al tiuj partoj de la mondo, kie la Internacia Lingvo apenaŭ aŭ tute ne havas adeptojn. Tio instigis lin al pionira laboro por krei Esperanto-movadon en multaj landoj de la Tria Mondo, precipe en Afriko kaj arabaj landoj, ĉiam celante, ke al la novaj esperantistoj la posedo de la nova lingvo fariĝu rimedo por plivastigo de siaj spiritalaj horizontoj kaj por persona kresko.”

Diplomo pri Elstara Agado estis asignita al la interretaj projektoj *lernu.net* kaj *edukado.net*. La plurlingva paĝaro *lernu.net* ekde 2002 helpas ret-uzantojn lerni Esperanton. Ĝi estas verŝajne la plej granda lernejo de Esperanto en

la mondo, vizitata 75 000 fojojn ĉiumonate. Ĉirkaŭ 7000 lernantoj jam kompletigis la unuan parton de ĝia baza kurso kaj 1500 finis la lastan, okan parton. La retejo *edukado.net* estis lanĉita en 2001 kaj estas prizorgata de Katalin Kováts. Ĝi subtenas kunlaboron inter instruistoj kaj helpas memlernantojn. En ĝi estas katalogo de lerniloj, „lerniloteko” kun ekzercoj kaj testoj, leĝejo, koresponda servo, ktp. La teamo de *edukado.net* realigis la Esperantan adaptan de la Komuna Eŭropa Referenckadro.

Premio Grabowski subtenas elstarajn atingojn en la Esperanta kulturo. Ĉi-jare ĝi havis interlingvistikan fokuson. Premiojn de po 1000 USD ricevis Ilona Koutny kaj Andy Künzli.

La hungara lingvistino Ilona Koutny kreis kaj de dek jaroj animas la Interlingvistikajn Studojn ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando. Spirita heredanto de prof. István Szerdahelyi, ŝi kvazaŭ transplantis la E-fakon de la Budapeŝta Universitato ELTE en polan grundon, kie ĝi disfloris internacie.

Andy Künzli, svisa historiisto, pli ol 15 jarojn laboris super la monumenta verko *Universalajlingvoj en Svislando*, enciklopedio pri la 100-jara historio de la Esperanta kaj cetera planlingva movado en Svislando. Pro siaj scienca kompetenteco kaj objektiveco la riĉa enhavo de tiu unika verko starigas modelon por aliaj.

Interesa komunajo inter la laŭreatoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Premio Grabowski estas, ke iliaj agadoj verŝajne estus malpli vastaj aŭ suferintaj de prokrastoj sen financa apogo de la fondaĵo Esperantic Studies Foundation. Eĉ se tio ne influis la decidon, la Estraro de UEA samtempe implice rekonis ankaŭ la gravan rolon de ESF kiel instiganto kaj subtenanto de novspecaj iniciatoj en Esperantujo.

Subvencio Cigno, financata de la japana mecenato Miyoshi Etsuo, subtenas agadon por disvastigi Esperanton en la Tria Mondo. Ĝi valoras 500 000 japanajn enojn (ĉ. 2950 eŭroj) kaj ricevis ĝin la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) por sia projekto Agado Srilanko. La projekto celas eldoni dudirektan sinhalan Esperanto-vortaron kaj sendi al Srilanko kompetentan esperantiston por gvidi konversacian kurson al la lokaj esperantistoj, ĝis nun izolitaj de la ĝenerala movado, kaj rektametodan kurson al ne-esperantistoj.



Vegetaranoj lernis Esperanton

En 2008 krom UEA centjariĝis ankaŭ Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) kaj Internacia Vegetarana Unio (IVU). La lasta havis fine de julio sian mondan kongreson, en kiu partoprenis ankaŭ esperantistoj.

La gepatroj staras mute, tre koleraj pri la bubo, ĉar la manĝo estas rubo... ĉar la manĝo... estas rubo! Korkuna germano promenis tra la kongresejo kaj provis rememori la ĵusan lecionon pri Esperanto.

Post delonga interkonatiĝo kun la esperantisto Christopher (Kristoforo) Fettes, la respondeculo de Eŭropa Vegetarana Unuiĝo fine decidis eklerni la lingvon internacian, legante poemon el Hirthara Petro. „La gepatroj staras... mutaj!“ La lerninto vagadis tra la kongresejo aŭtomate serĉante sian tablon, konscie miranta pri la simpleco kaj beleco de la ĵus nove lernita lingvo. Eble fiklaĉemuloj dirus ke li estis sub impresoj pri la matenmanĝa leciono kun la ĵuna instruistino, Heidi Goes. Tamen li bone memoris la lingvon kiam la postan tagon oni donis al li por manĝi iom tro salan supon. „Rubo!“ li tuj diris, post la unua kulergustumo kaj flanken forpuŝis la supujon.

„Saluton!“ Oni aŭdis en la kongresejo. Heidi kaj mi rigardis ĉirkaŭ ni, mirante pri ĵuna voĉo Esperanta, kiu kaptis nin ĝuste antaŭ nia eliro el la kongresejo. Ĉu samideanino ne atendita, kiu partoprenas la kongreson? „Saluton“, ni denove aŭdis. La voĉo venis de supre, ni tien rigardis kaj vidis, mansvinganta, la ĉarman ĵunan aŭstrinon, kiu aktive partoprenis la E-kurseton. Ŝi estis sur la interna balkono de la unua etaĝo, rigardante la teretaĝan halon. Ŝi vidis nin kaj eksalutis Esperante! Pro hazarda koincido, ŝi estis ĝuste ĉe la simbolo de TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio), pendigita kune kun aliaj afiŝoj de aliaj asocioj sur la balkonaĵo, por esti videblaj por la kongresanoj. „Saluton! Ĝis morgaŭ por la kurso“, ni feliĉe respondis. Kaj, dum la lasta tago de la kurso, ŝi venigis ĉiujn siajn amikojn, por ke ili havu almenaŭ ideon pri tio, kio estas Esperanto.

Tiuj ĉi du estas klaraj ekzemploj pri la sukceso de la esperantista partopreno dum la monda vegetarana kongreso, kiu grupigis inter ses- kaj sepcent vegetaranojn el la tuta mondo.

Aktivuloj de TEVA decidis ke la partopreno



en tiu kongreso estas ege grava, kaj post la UK en Roterdamo, anstataŭ reiri hejmen aŭ ripoze ferii, decidis kongresferii por prezenti Esperanton en monda neesperantista aranĝo. Danke al la laboro de la pasintaj

monatoj kaj al la bonaj rilatoj kun la Internacia Vegetarana Unuiĝo, TEVA havis budon dum la tuta kongressemajno, prezentis du prelegojn en la oficiala programo pri Esperanto kaj organizis kvartagan kurseton pri Esperanto dum la tagmanĝa paŭzo.

En la unua prelego Christopher Fettes parolis pri internacia amikeco inter vegetaranoj familioj pere de Esperanto, kaj montris fotojn pri internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, kie partoprenis multaj infanoj. En la dua prelego mi parolis pri la historiaj kaj ideologiaj ligoj inter la vegetarana kaj Esperanta movadoj. La vegetaranoj miris pri tio ke la esperantistoj multe kontribuis al la fondiĝo de la Internacia Vegetarana Unuiĝo. Fakte la vegetaranoj, antaŭ 100 jaroj, decidis kunveni en Dresdono por fondi sian unuiĝon ĝuste pro tio ke la esperantistoj jam planis tie okazigi la kvaran Universalan Kongreson. Simile por festi la centjariĝon, la ĉi-jara kongreso okazis en Dresdono, kaj ĉiuj partoprenantoj estis informitaj pri la rolo de Esperanto: kaj en la ĉefa artikolo en la kongresa libro kaj dum oficialaj inaŭguro kaj parolado de historiisto pri la vegetarana movado.

Ni sukcesis montri al la kongresanoj ke Esperanto daŭre ekzistas, kaj el nia amikema sinteno rezultis multaj bonaj kontaktoj. Sed ne nur tio: kelkaj el ili serioze pripensas partopreni en la venonta UK!

La agado de TEVA estis, por uzi la vortojn de José Antonio Vergara, estrarano de UEA pri faka kaj scienca agado, ege trafa maniero festi la datrevenon, ĉefe ĉar ĝi estis brila kaj vigla agado ekster la limoj de Esperantujo. Kutima problemo pri kiu mi jam skribis en tiu ĉi revuo pasintjare (v. *Esperanto*, oktobro 2007, p. 200) estas la fermiteco de nia movado. ▷



Francesco Maurelli, Christopher Fettes kaj Heidi Goes.

La esperantistoj ŝatas ludi inter si kaj ne tiom ofte estas emaj iri ekster nia mondo kaj kunaranĝi eventojn kun aliaj neesperantistaj organizaĵoj. Post la sukceso de la pasintjara junulara programo dum la japana UK, tute malfermita al la ekstero kaj kun granda sukceso inter la neesperantistoj, la ĉi-jara UK, kvankam bunta, interesa, plenplena de programeroj, fiaskis ĝuste en tio: paroli kun la neesperantistoj. Sen konsideri la senrespondajn demandojn: „Pardonu, ĉu vi scias kie estas Esperanto?” de Dennis Keefe al la homoj kiuj promenis proksime al la kongresejo aŭ eĉ al deĵorantoj de vendejoj tute apudaj al la CO, klara ekzemplo estis la internacia vespero. Ĝi estis tre bela, kiel kutime. Tamen luma ekzemplo pri la fermiteco pri kiu mi parolis. Dum niaj artistoj arte artumis en nia ora kastela kongresejo, tute apude estis granda urba festo.

Nia tradicia aranĝo povintus havi ligojn kun tiu manifestacio, kaj ni povintus montri kiel Esperanto tiom bone funkcias kiel ponto inter diversaj artistoj. Male, la ekstero eĉ tute ne sciis pri la Esperanto-kongreso. Tamen, la kongresanoj kiuj sidis en la salono apud la fenestroj povis ĝui samtempe ambaŭ festojn, ofte ekstarante por vidi la paradon kaj sinsekve sidigante por spekti la artadon.

Tio kion la vegetaranoj faris dum la lastaj monatoj ne devas resti nur guto en la verda maro. Sen interago kun la ekstero, ĉiuj fermitaj komunumoj iam mortis kaj plu mortos la novaj. Kaj tio estis kio ŝokis min en mia unua Universala Kongreso, en 2003. Tiam mi partoprenis en pluraj aranĝoj de fakaj asocioj kaj ofte la plejmulto de la kunventempo estis uzata por plendi pro la manko de membroj kaj manko de organizado. Mi esperas ke tio kion ni faris (kaj niaj estontaj planoj), povas esti instigilo por la aliaj fakaj asocioj. Ili havas grandan privilegion, kiun loka grupo kun budo al publika manifestacio sopiras: ili ja havas difinitan celgrupon kaj ja estas mem en tiu celgrupo. La tasko estas multe pli facila, ĉar oni konas la interesojn de la alparolataj kaj oni povas pli facile enkunteksti Esperanton por ke ĝi aspektu alloga ĝuste por ili.

Mi finas rigardante antaŭen. Ni havas planojn por organizi gravan aranĝon kun neesperantistaj vegetaranoj okaze de la venonta UK en Bjalistoko. Kaj ni jam pensas por la sekvaj jaroj. Ni havas konsenton pri la ĉeesto de TEVA dum la venonta monda vegetarana kongreso,

en Indonezio (oktobro 2010), dum kiu ni planas grandan informkampanjon pri Esperanto. Kiuj aliaj fakaj asocioj pretas organizi ion similan en sia fako? Tiuj kiuj respondos, certe travivos la defiojn de la tria jarmilo.

Francesco Maurelli

KOTIZTABELO DE UEA POR 2009

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2009.

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	16	40	100	60	36	200
Aŭstrio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Belgio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Brazilo/eŭro	5	12	30	18	11	60
Britio/pundo	7	18	45	29	18	90
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	425	2100
Danio/krono	70	175	440	280	180	880
Estonio/krono	100	240	600	380	245	1200
Finnlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Francio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Germanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Greklando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hispanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hungario/forinto	1600	4000	10000	6400	4000	20000
Irlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Islando/eŭro	10	24	59	35	21	118
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Japanio/eno	1500	3700	9200	5500	3300	18400
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Latvio/lato	4	11	27	17	11	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	20	50	125	75	45	250
Pollando/zloto	20	50	130	80	50	260
Portugalia/eŭro	8	20	50	32	20	100
Rusio/eŭro	5	12	30	18	11	60
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	17	84
Slovenio/eŭro	7	18	45	29	18	90
Svedio/krono	90	220	550	350	220	1100
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	13	32	79	47	28	158
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	5	12	30	18	11	60

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFO A: Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM(-T): Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*

DMJ(-T): Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membrecon en TEJO kun *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Lee Chong-Yeong (1932-2008)

Sojle de la 93-a UK en Roterdamo venis la funebra sciigo, ke prof. d-ro Lee Chong-Yeong, eksa prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, forpasis post elĉerpa malsano la 4-an de julio en la aĝo de 76 jaroj. Per silenta minuto en la Solena Fermo la kongresanoj omaĝis al memoro de unu el la plej elstaraj gvidantoj en la lastatempa historio de la movado.

Prof. Lee naskiĝis la 13-an de februaro 1932. Li studis ĉe la universitatoj Yeungnam (Koreio), Hawaii kaj Harvard (Usono) kaj doktoriĝis pri komerca ekonomiko en la Universitato de Kobe (Japanio). Dum sia profesia kariero li estis ĉefo de la merkatura grupo de la UN-organizaĵo pri Nutraĵo kaj Agrikulturo, kaj profesoro de la Kyungpook Ŝtata Universitato (Korea Respubliko). Li estis ĉefkonsilanto de la Korea Industria kaj Evoluiga Instituto, gastprofesoro de la Universitato de Kobe, honora profesoro de la Nankaj-Universitato (Ĉinio) kaj orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

Lee Chong-Yeong lernis Esperanton aŭtodidakte kiel lerneĵano en 1948. Li estis vicprezidanto de la 79-a UK en Seulo (1994) kaj prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (1994-95, 1998-2001). Li estis longtempa komitatano de UEA (1989-2007) kaj laste ankaŭ ano de la Elekta Komisiono (2006-2007). En la Estraro de UEA li membris en du periodoj: kiel prezidanto (1995-1998) kaj kiel vicprezidanto (2001-2004). Kiel prezidanto de UEA li distingiĝis kiel dinamika kaj iniciatema gvidanto, kies plena sindediĉo al Esperanto, sincereco kaj persona ĉarmo faris lin amata de ĉiuj. Tre proksima al lia koro estis la intensigo de rilatoj de UEA

kun internaciaj organizaĵoj, aparte kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, kies kutimojn kaj labormanierojn li konis el sia propra profesia sperto. Post sia prezidantiĝo li kuniniciatis la 1-an Nitobe-simpozion en la Universala Kongreso en Prago en 1996 kaj la Manifeston de Prago, kiu estis subskribita de pli ol 13 000 esperantistoj kaj plu restas la gvida dokumento pri la celoj de la nuntempa Esperanto-movado. En 1996 prezidanto Lee lanĉis Kampanjon 2000, kiu kune kun la Manifesto de Prago katalizis senteblan pliakiviĝon en UEA kaj la cetera

movado. Kadre de ĝi okazis i.a. la 1-a Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj en la Ĝeneva Palaco de Nacioj sub aŭspicioj de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj.

Lee Chong-Yeong verkis *Esperanto en la 21-a jarcento* (2001), *Esperanto, la lingvo de la 21-a jarcento* (en la korea, 2001), *Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj* (2003) kaj *80-jara historio de la korea Esperanto-movado* (en la korea, 2003), *Ridante lernu* (2007), kaj *Elektitaj Zamenhofaj proverboj* (2008). Li ankaŭ havis esencan rolon en la estigo de la Esperanta eldono de *Historio por malfermi estontecon* (2007), pionira komuna libro pri la moderna historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio.

En 2004 Lee Chong-Yeong estis elektita Honora Membro de UEA pro siaj elstaraj meritoj por UEA kaj la tutmonda Esperanto-movado. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Korea Esperanto-Asocio. La ĉina ŝtato dekoraciis lin per la Medalo „Entuziasma Subteno de Konstruo kaj Kunlaboro por Ĉina Amikeco”, kaj la ŝtatprezidanto de Vjetnamio per la Medalo „Entuziasma Subteno por la Vjetnama Esperanto-Movado”.



La neceso reinventi Budapeŝton

Kio okazas kiam kvindeko da homoj, kiuj instruas la lingvon aŭ la fenomenon Esperanto en universitato, parolas pri tiuj temoj dum du plenaj tagoj?

La konferenco en la Universitato de Amsterdamo, loke organizita de Wim Jansen, docento de interlingvistiko, donis respondon. Ĝuste antaŭ la UK en Roterdamo kunvenis universitatoj kiuj intruas interlingvistikon aŭ Esperanton, sub la aŭspicio kaj subteno de Esperantic Studies Foundation. Partoprenis 50 homoj el 23 landoj sur kvar kontinentoj, reprezentantaj 37 universitatojn aŭ similajn instituciojn. *Ni volas eviti la forfalon de Budapeŝto eble pro neatentigo* deklaris Humphrey Tonkin.

Nuntempe estas pli facile komuniki internacie danke al diĝitaj teknologioj kaj do interŝanĝi spertojn, materialojn kaj homojn. Ankoraŭ bedaŭrinde la ĉeso de la historie grava instruado de Esperantologio en la universitato ELTE, iniciatita de István Szerdahelyi en Budapeŝto, kiu okazis pro manko de taŭga teamo kiu scipovas daŭrigi la katedron kaj adapti ĝin al la Bolonja Procezo (vd. p. 207, 3a alineo de Praktikaj kaj konkretaj decidoj). Tio stimulis la starigon de pli proksimaj kontaktoj kun universitatoj kiuj sin okupas pri tiuj temoj, kunvenigante ilin en la sama loko por du tagoj. La konferenco komenciĝis per ĝenerala enkonduko de John Wells, kiu difinis la disciplinojn *Esperanto* kaj *interlingvistiko*. Poste homoj kunvenis en plenaj sesioj aŭ en tri laborgrupoj, pri studprogramoj (respondecis Wim Jansen), administrado (respondecis Sabine Fiedler), kaj interŝanĝoj (respondecis Ulrich Lins).

Interlingvistiko kaj Esperanto: dialektika rilato

La ĉefa intereso de la partoprenantaro estis la instruado de Esperanto en universitato. Ĝenerale freŝbakitaj studentoj havas nenian antaŭkonon pri interlingvistikaj temoj kaj esperantologio, laŭ la enketiloj kies plenigon multaj docentoj postulas. Do efektive necesas enkonduko al la temoj antaŭ ol instrui la lingvon mem, se tio eblas. Fakte foje oni devas elekti ĉu instrui interlingvistikon kun aŭ sen lingva kurso pri Esperanto, pro manko de tempo aŭ mono, depende de la universitata kunteksto. Ĉiuokaze, la rolo de universitatoj ne estas baki movadanojn, sed doni sciencon aliron al la temo. Tio signifas, ke se ne eblas starigi lingvan kurson, oni almenaŭ prezentas interlingvistikon kiel sciencon: la rimedoj por studentoj sekvi lingvan kurson de Esperanto estas multaj, ankaŭ for de la universitato. Oni substreki la eblon instrui Esperanton distance tute senkoste al universitatoj, ekzemple per la portalo *lernu.net*.

Kiel ĉia ĉeranda disciplino, oni povas alproksimiĝi al interlingvistiko de almenaŭ du aliroj. La unua aliro estas onidire historia, kaj ĝi koncernas precipe planlingvistikon. Tipaj temoj estas: la aprioraj lingvoj de la deksepa jarcento, volapuko, Esperanto kaj la ĉefaj posteuloj – Latino sine Flexione, Ido, Occidental/Interlingue, Novial, Interlingua de Alexander Gode.

Kutime oni donas bazon pri la strukturo de ĉi tiuj planlingvoj, eventuale kompare al ludcelaj lingvoj, kiel ekz. la klingona, ĝuste por evidenti diferencojn kun Esperanto. Paralele al tio, la historio de la por-Esperanta movado prezentatas, kune kun ĝiaj ĉefaj eroj: neŭtrala, klasbatala, religia. La rolo de literaturo ja devas ne esti neglektata.

La dua aliro estas pli socie orientita. Oni konsideras kiel parton de interlingvistiko la difinon de lingva(j) problem(oj), la nocion de lingvopolitiko kaj planado, kaj kiel flankajn disciplinojn la problemojn de tradukado kaj interpretado kadre de interkulturismo kiel rezulto de multlingvismo. Kiel substrekte de Wells en la ĝenerala enkonduko, multaj kulturaj aspektoj de la origina fono kie ekstaris Esperanto, estas ankoraŭ nekonataj de la ĝenerala internacia klera publiko: tiun specifan parton de planlingvistiko oni pli profundigu dum la studado.

Kiel duonŝerce diris Humphrey Tonkin, ekzistas homoj kiuj ekscitiĝas pri volapukaj verboj, kaj homoj kiuj male freneziĝas pro lingvaj problemoj: tio signifas, ke la du aliroj devas kunvivi en ĝenerala prezento de la temo, por atingi la plej grandan nombron de la homoj. Alia pridiskutata temo estis distanca lernado. Ekzemple, ĉu indas devigi surlokan intensan semajnfinojn por ekzameniĝi post retkursoj, eventuale dum Esperanta aranĝo? Multaj ĉeestantoj jesis al la ideo.

Kie oni enmetu la propedeŭtikan valoron de Esperanto dum kursoj? Ĝenerala interkonsento estis, ke utilas substreki la rilaton de Esperanto al siaj fontolingvoj. Ekzemple, la vorto *oni* egalas funkcio kaj al



Foto: Sonja Lundberg-Petrović

la franca *on* kaj al la germana *man*: plenkreska lernanto kutime aprezas tiujn informojn, tiel ke Esperanto perceptiĝas kiel ŝlosilo al aliaj lingvoj. Alia ideo estas doni kelkajn frazojn en Esperanto dum enkonduka kurso de lingvistiko, por klarigi ekzemple kiel funkcias aglutina lingvo (kompreneble, tio ne utilas al finnoj aŭ hungaroj). Ĉar la plejmulto de la partoprenantaro enfokusigas la instruadon de Esperanto en la universitatoj, estontaj kunvenoj aŭspicie povus estiigitaj al ILEI.

Praktikaj kaj konkretaj decidoj

Almenaŭ en Eŭropo, lingvaj kursoj de Esperanto devas referenci al la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj, por esti komparataj kun la aliaj. Tiel la starigo de Esperantokursoj estas malpli ŝanceblebla en universitataj medioj, ĉar oni povas ĝin kompari kun similaj kursoj pri etnaj lingvoj.

Jam nun la amaso de materialo en *edukado.net* ekaktualigas la laŭniveligon de la ekzercoj ĝuste kun la klasifikado komuneŭropa: venontaj lernomaterialoj devos havi tiun klasifikadon de la komenco. Tamen oni ne konsideru la regulojn de EU nur kiel kroman farendaĵon. Laŭ la Bolonja Procezo, estiĝis la eblo starigi sendependajn modulojn de lernado, tio estas lernunuojn ne rilatajn al „oficialaj” kursoj. Tio estas alia bona ŝanco por kursoj de esperantologio aŭ interlingvistiko universitate.

Estiĝis ankaŭ la demando pri starigo de reta inventaro de la materialo pri interlingvistiko kaj materialoj pri Esperanto je universitata nivelo. Oni substreki interalie la neceson havi kolektojn de diplomlaboraĵoj pri tiuj temoj – almenaŭ bazinforme: titolo kaj resumo, ĉu je ĝenerala dispono, ktp. Ni nepre utiligadu la jam ekzistantajn retpaĝarojn, kiel *edukado.net*, tre atente prizorgata de Katalin Kováts, aŭ *interlingvistiko.info* de la teamo E@I.

Interŝanĝoj

La eblo starigi interŝanĝojn estis unu el la celoj de la konferenco. Ulrich Lins prezentis la eblojn proponitajn de DAAD, la germana servo por interŝanĝo de universitanoj, kaj donis konsilojn por akiri monrimedojn por la projektoj prezentitaj. Esence, oni devas ligi Esperantajn kaj interlingvistikajn temojn al pli vasta temaro: ekzemple, se germano volas okupiĝi pri la historio de la japana Esperanto-movado kaj sukcesas havi kontakton kun japana universitato, la ŝancoj estas pli altaj ol ĉe projekto kies kerna temo estas Esperanto en si mem. Fakte, interŝanĝo unuflanke helpas la karieron de la invitito, sed aliflanke plialtigas la prestiĝon de la invitinto je la loka nivelo. Kelkaj homoj plendis pri la neserioza konsidero de niaj temoj fare de rektoroj aŭ pli ĝenerale dekanoj, kaj estiĝis vigla diskuto. Evidentiĝis, ke la situacio tiel malsimilas de loko al loko, ke ne eblas eltiri konkludojn. Ĉi-flanke interŝanĝoj povas helpi. Se ne eblas alimaniere, oni povas inviti vizitantojn universitatanojn per temoj aliaj ol interlingvistiko aŭ Esperantologio, kaj poste prezenti tiujn du temojn kiel kroman esplorintereson. Efektive la plejmulto de la partoprenantaro laboras en siaj universitatoj kiel esploristoj aŭ profesoroj per alia temo, ofte nur rande tuŝanta interlingvistikon kaj Esperanton.

La valoro de niaj internaciaj bibliotekoj devas iĝi centra por plialtigi kaj plinombri interlingvistikajn esplorojn, kaj tio estis plurfoje subtekstata dum la kunveno. Estas jam kelkaj bonaj ekzemploj de interŝanĝoj, do ni ne reinventu la radon. Ilona Koutny prezentis la imponan laboron faritan en Poznano, sub la ombrenomo „efika interkultura komunikado en EU”. Alia ekzemplo – pli modesta sed

ĉiukaze bona – estis la invito de Detlev Blanke al la Universitato de Zagrebo, kiu bone impresis la lokan akademian medion. La plej viglaj centroj pri interlingvistiko, interalie Stokholmo, ŝajnis pretaj kondukti simile. Aparta ideo venis de Dennis Keefe, kiu atentigis, ke ĉinaj studentoj volonte studus Esperanton, se tio permesus al ili perfektigadi sian studprogramon eksterlande. Fine, oni sugestis, ke ekzistu centra servo de UEA pri zorgado de la administraj aferoj ligitaj al monfontoj, precipe ĉe EU, por faciligi interŝanĝojn.

Internaciaj libroj pri esperantologio

La manko de nacilingvaj manlibroj por studentoj estas preskaŭ ĝenerale agnoskata. Ununura escepto estas kurslibroj pri la lingvo Esperanto; tamen, multaj ĉeestantoj taksas tre grave, ke ni verku kaj havu je nia dispono sciencajn enkondukojn al Esperanto kaj interlingvistiko (inkluzive esperantologion). Efektive multaj materialoj ekzistas, sed ili ne estas kunordigitaj, pro metodologiaj kaj lingvaj kialoj. Ekzemple, en Amsterdamo ekzistas sufiĉe kompleta manlibro en la nederlanda, fare de Wim Jansen, sed la aŭtoro taksas ĝin nematura por rekta tradukado en aliajn lingvojn. Do, estiĝis grupo da interesiĝantoj por kunverkado de libro sciencnivela pri interlingvistiko. Wim Jansen kaj Federico Gobbo estos la kunorganizantoj, dum ĉiu kontribuanto estos respondeculo pri ĉapitro, tiel ke laŭbezone oni povas elekti kiun ĉapitron uzu la studentoj. La patrino versio estos en Esperanto, kaj estas planataj tradukoj almenaŭ en la angla, germana, itala, nederlanda. Alia propono estas libro pri enkonduko al Esperanto laŭ scienca vidpunkto.

Propono pri doktoriĝa lernejo

Per la esprimo *doktoriĝa lernejo* (cetere, vikle pridiskutata dum la kunveno) ni celas tipan scienca someran seminarion, kutime unu aŭ du semajnojn longan, organizitan kadre de rekonataj universitataj institucioj. La celo estas alvenigi doktoriĝajn studentojn pri lingvistikaj aŭ politikaj kaj ekonomiaj aferoj, kaj enkonduki ilin al lingvaj problemoj kaj al interlingvistiko. Oni povas konsideri NASK kiel la plej konkreta ekzemplo en Esperantujo, nuntempe, kvankam ĝi ne estas iel ajn doktoriĝa. Pri la loko, ĝenerala prefero iras al Eŭropo, kaj oni eĉ proponis uzi taŭgan Esperanto-domon, kiel ekzemple la kastelon en Grezijo.

Finaj rimarkoj

La kunveno sukcesis jam pure kaj nure pro la simpla fakto, ke multaj partoprenantoj konatiĝis persone unuafoje. Fakte multaj jam havis kontaktojn per retaj rimedoj, sed neniam estiĝis eblo firmigi rilatojn per personaj, vivaj kontaktoj, kio estas neanstataŭigebla maniero progresigi Esperanton ĉe universitatoj. **Federico Gobbo**



Foto: Josef Vojáček

Nederlandaj lingvoj (II)

Nederlando estas plurlingva lando. Krom la nederlanda la oficialan statuson havas ankaŭ la frisa lingvo, kaj du parolaj idiomoj estas rekonitaj kiel eŭropaj regionaj lingvoj: la limburga kaj la nedersaksa.

Fine, ni ne forgesu la lingvojn de ekonomiaj migrantoj kaj azilantoj, kiuj dum la lastaj kvardek jaroj trovis sian hejmon en Nederlando. Ilia listo estas tre granda: estus pli facile diri kiujn lingvojn oni ne parolas en Nederlando! En Roterdamo mem oni parolas ĉ. 200 diversajn lingvojn! Ni menciui nur la plej gravajn kaj unu el ili estas la araba (precipe ties magreba dialekto) kaj diversaj berberaj lingvoj, inter kiuj elstaras la tamazihta. Tiun lingvon parolas la plej multaj el la nederlandaj 300 000 marokanoj. Gravas menciui ankaŭ la turkan, la lingvon de preskaŭ 300 000 nederlandanoj. Simila cifero validas ankaŭ por surinamanoj kaj araboj, sed ne estas certe kiom da ili parolas kiun el la lingvoj. Cetere, inter la „turkoj“ estas granda kvanto de kurdoj; malfacile diri kiom, sed verŝajne pli ol 50 000.

Inter aliaj migrulaj lingvoj ni menciui nur provizoran liston de la plej gravaj: la portugala (inkluzive de la portugala kreola lingvo de multaj kabverdanoj, eble ĉ. 100 000), hispana, itala, greka, la t.n. serbo-kroata en siaj diversaj variantoj: bosna, kroata, montenegra, serba. Kompreneble ne mankas parolantoj de la albana, makedona, armena, kartvela kaj aliaj kaŭkazaj lingvoj; kaj tiel plu, kaj tiel plu. Lastatempe pli kaj pli ofte oni renkontas ankaŭ la persan, urduan kaj aliajn pakistanajn lingvojn, iujn afganajn lingvojn kiel la puŝtua aŭ daria k.s. Multnombros ankaŭ la parolantoj de tute freŝdataj novalvenintoj: rusoj, rumanoj, bulgaroj... Krome vi povos rimarki en Roterdamo diversajn preĝejojn skandinavajn: danan, svedan, finnan kaj norvegan. Ankaŭ tiuj skandinavoj estas roterdamanoj kontribuantoj al la lingva bunto de Nederlando. Ni ne preterlasu menciui multajn germanojn: kun pli ol 400 000 membroj germanoj estas fakte la plej granda grupo de eksterlandanoj en Nederlando. La parolantojn de la angla ni tute ne devas menciui. Tiun lingvon en Nederlando parolas praktike ĉiuj. Oni efektive uzas ĝin kiel helplingvon en multaj situacioj. Lando kiu vivas de komerco kaj sia trafika pozicio ne povas vivi sen la angla. Kaj, ni ne forgesu: en Nederlando situas la sidejo de nia lingvo, Esperanto. En kafejo kie mi venas regule, mi povas uzi la lingvon praktike ĉiumatene!

Nu, ni preskaŭ nenion diris pri la nederlanda mem, kiu ja estas LA lingvo de praktike ĉiuj loĝantoj de Nederlando. Ĝi kunligas la diversajn etnajn grupojn kaj estas ne nur funkcia sed ankaŭ simbola ligilo de la etna kalejdoskopo nederlanda. Ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi konciza prezento ne estas ĝia denaska parolanto, sed tamen konsideras la lingvon kiel sian kaj karan. Tiu lingvo estas la kunliga fadeno de ĉiuj loĝantoj de Nederlando. La lingvo kunligas nederlandanojn kun iliaj flandraj kaj germanaj najbaroj, sed ankaŭ transmare kun surinamanoj, antilianoj kaj parto de sudafrikanoj. La afrikansa rilatas al la nederlanda simile kiel Ido al Esperanto. Temas pri parte kreoligita sudholanda dialekto, kiu dum lastaj cent jaroj fiksiĝis kaj evoluis kiel aparta lingvo. Tiu lingvo parolatas ankaŭ en Namibio, interalie de aparta miksitaj

etna grupo, t.n. bastardoj. Iam oni parolis la afrikansan en Zimbabvo kaj Bocvano, sed tiuj tempoj pasis. Pli kaj pli da afrikansparolantoj nuntempe

ni trovas en Aŭstralio aŭ Kanado. La afrikansa en Sudafriko rapide malkreskas kaj malgraviĝas, malgraŭ siaj 5 milionoj da parolantoj. La nederlanda naskis ne nur la afrikansan sed plurajn aliajn kreolajn lingvojn, kiel la tiel nomata negra holanda (iam sur La Virgulinaj Insuloj) kaj la Barbican Hollands, kiuj nuntempe malaperis. La nuna Novjorko iam estis Nova Amsterdamo, Brooklyn estas la nederlanda loko Breukelen, kaj Harlem estas Haarlem. En tempoj kiam holandaj komercistoj interŝanĝis felojn kun indianoj, estiĝis iaspeca holanda piĝino por komuniki kun lokaj indianoj. Nu, la nederlanda ne estas nur lingvo, sed esence lingvaro, unu lingvo kun multaj vivoj. Interesa lingvo por interesa movado kiel la Esperanta. El la studo de vivo kaj vivformoj de la nederlanda esperantistoj povas multon lerni. Tio estas plia kialo kial mi amas la lingvon de mia nova lando.

Nikola Rašić


kroata nederlandano aŭ nederlanda kroato



**VIZITU VIAN PROPRIAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM**

MALFERMA TAGO

sabaton la 29-an de novembro 2008 (10h00 - 17h00)



- ★ Andy Künzli pri Hector Hodler kaj pri la CO en Genevo
- ★ Kantisto-gitaristo Alejandro Cossavella



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro kaj loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Al la Hebreoj. Anonima. El la greka trad. G. Berveling. Zwolle: VoKo, 2008. 37p. 21cm. Ĉu letero, prediko aŭ diatribo (t.e. traktaĵo) estas ĉi tiu anonima teksto dum longa tempo atribuita al S-ta Paŭlo? € 1,50

Al justa lingvopolitiko en Azio / Towards Equitable Language Policy in Asia / Azia ni okeru kouseina gengoseisaku ni mukete. Aktoj de la 5a Nitobe-Simpozio. Tokio: European Institute, Sophia University / Japana E-Instituto, 2008. 219p. 26cm. ISBN 9784888870542. Trilingva (E, angla, japana). € 12,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Beitrag zum Begräbnis des Esperanto?, Ein. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Iltis, 2008. 42p. 21cm. ISBN 9783932807725. Germanlingva. Kritikaj

notoj pri *Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto* de Erich-Dieter Krause. € 6,60

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto. Geoffrey Sutton. Prefaco de Humphrey Tonkin. New York: Mondial, 2008. 728p. 24cm. ISBN 9781595690906. Bind; Anglalingva. Detala kaj bone dokumentita rigardo al 120 jaroj da Esperanta literaturo. € 45,00

Detektivu pri la Krime de Katrina. Katalin Kováts. Hago: E-duKati, 2008. 42p. 30cm. Ilustrita ekzercaro por la rakonto de Sten Johansson *Krime de Katrina*. € 9,00


Dore domilado solresol. Historio, gramatiko, leksikono de la universala muzika lingvo Solresol. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2008. 27p. 21cm. ISBN 2906134813. € 3,60

Dormanto vekigās, La. H.G. Wells. El la angla trad. A.F. Milward. Rotterdam: Bero, 2008 (2-a eld). 214p. 21cm. La kvina volumo en serio de utopiaĵoj. Kion trovos en Anglio viro dorminta dum du jarcentoj? € 14,10

Fatalo. Louis Couperus. El la nederlanda trad. G. Berveling. Zwolle: VoKo, 2008. 137p. 20cm. Vojaĝo al Skandinavio inspiris ĉi tiun romanon verkitan fine de la 19a jc. € 15,00


Gardanto de la sojlo, La. Animaj okazoj en scenaj bildoj. Rudolph Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2008. 106p. 21cm. Daŭrigo de *La pordo de inicado* kaj *La provo de la animo* de la sama aŭtoro. € 9,00

Internacia Kongresa Universitato 2008. Roterdamo, Nederlando, 19-26 julio 2008. Red. J.A. Vergara. Rotterdam: UEA, 2008. 115p. 30cm.



Prelegoj de H.M. Maitzen, B.-A. Wickström, J. Wells, K. Sayadpour, J. Pietiläinen, G. Greatrex, M. Gutiérrez González, M. La Torre, P. Dasgupta, B. Ragnarsson. € 15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. Rotterdam: UEA/ILEI, 2008 (3a eld). 39p. 21cm. ISBN 9789290171941. € 4,50. Triona rabato ekde 3 ekz.



Japana Esearo n-ro 4. Div. aŭtoroj. Tokio: Libroteko Tokio, 2008. 93p. 21cm. ISBN 9784947728326. Dek tri diverstemaj eseoj verkitaj de japanaj aŭtoroj. € 7,50

Jaro, La. Poŝkalendaro 2009. Antwerpen: FEL, 2008. 120+31p. 15cm. € 5,10

Kantoj por ĝojo. Kompilis Stanislava Chrdlová. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2008 (2-a eld.). 63p. 17cm. ISBN 9788087169001. Trideko da popularaj kantoj, kun tekstoj kaj muziknotoj. € 4,80

Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo? Kompilis kaj antaŭparolon verkis Júlia 'Sigmond. Triade, 2008. 144p. 20cm. ISBN 9789738313712. Ilus. Kolekto de kontribuajoj al la samtitola rubriko de la Esperanta bulteno *Bazaro* aperanta en Cluj-Napoca, Rumanio. € 9,90

Kompato por la kolombo. Yves Brusq. El la bretona trad. la aŭtoro. Rennes: Espéranto-Bretagne, 2008. 59p. 21cm. ISBN 2952097844. Manpleno da kontraŭmilitaj kaj porpacaj poemoj. € 5,10

Kongresa libro de Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj. Vilnius, 2008. 118p. 21cm. ISBN 9789955034742. Ilus. Manlibro kun detala programo de la kongreso kaj adresaro de partoprenantoj. € 9,00

Kongresa libro de Universala Kongreso. Rotterdam: UEA, eldonata ĉiujare. 128p. 21cm. ISSN 00833851. Kun fotoj. Manlibro kun detala programo pri UK kaj adresaro de partoprenantoj. € 6,00

Lecții de esperanto pentru începători. Tudor Denectin. Eubee, 2006. 130p. 20cm. ISBN 9789736730641. Dek ses detalaj E-lecionoj por rumanlingvanoj; kun abundo da ekzercoj (kun solvoj). € 4,80


Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto. Wendy Heller. El la angla trad. B. Westerhoff. Antverpeno: FEL, 2007. 398p. 20cm. ISBN 9789077066362. Ilus. Aŭtoritata

biografio pri la filino de la iniciatinto de Esperanto. € 27,60

Metropoliten. Vladimir Varankin. Antaŭparolo de M. Bronŝtejn. El Esperanto trad. A. Aleksandrova. Moskva: Impeto, 2008. 238p. 22cm. ISBN 9785716101739. Ruslingva traduko de klasika romano verkita originale en Esperanto. € 15,00

Naturaj vortordoj en Esperanto. Wim Jansen. Rotterdam: UEA, 2008. 40p. 21cm. ISBN 9789290171034. Resumo el selektitaj temoj, traktitaj en la doktoriga disertacio de la aŭtoro *Woordvolgorde in het Esperanto*. € 4,50. Triona rabato ekde 3 ekz.

Neceso akceptebla, La. Balduur Ragnarsson. Novjorko: Mondial, 2008. 114p. 22cm. ISBN 9781595690968. La plej freŝaj poemoj de la islanda aŭtoro, verkitaj post la apero de *La lingvo serena*. € 10,50



Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj. Louis Couperus. El la nederlanda trad. G. Berveling. Rotterdam: UEA, 2008. 180p. 21cm. ISBN 9789290171027. Deko da rakontoj de nederlanda verkisto ne aparte fama dumvive, sed lastatempe „remalkovrita“. € 9,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

Raportoj pri la invitprojekto. 20 invititoj el Azio al la 92a UK en Jokohamo. Tōkyō-to: JEI, 2008. 71p. 30cm. Ilus. Raportoj de la invitintoj kaj de la partoprenintoj. € 4,80

Reala homo en la homa realo. Ryszard Kapuściński (1932-2007). Tomasz Chmielik. Bydgoszcz / Świdnik: Skonpres / Libro-mondo, 2008. 56p. 21cm. ISBN 9788389962119. Rigardo al la vivo de mondfama pola ĵurnalista-raportisto. € 6,30

Salvo al la nigra bubalo. Nándor Gion. El la hungara trad. L. Huszár. Budapeŝto: Zsoli, 2008. 122p. 21cm. ISBN 9630644969. Kvazaŭdaŭrigo al *La kormoranoj ankoraŭ ne revenis*. € 12,00

Spirita vivo en la socio. Omraam Mikhaël Aïvanhov. El la franca trad. C. Piron. Fréjus: Prosveta, 2008. 19p. 21cm. Personaj opinioj rilataj al la konstanta demando „Kio estas homo kaj kiel ĝi perfektigaŭ?“ € 2,10

Talpoĉasisto, La. Stephan Lang. El la nederlanda trad. G. Berveling. Antverpeno: FEL, 2007. 127p. 21cm. ISBN 9789077066353. Transilvania rifuĝinto revenas al sia denaska lando kaj malkovras sekreton pri sia deveno. € 18,60

Tuj apude. Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA. Humphrey Tonkin. Rotterdam: UEA, 2008. 56p. 20cm. ISBN 9789290171065. Plene ilustrita poŝformata gvidlibreto. € 7,50. Triona rabato ekde 3 ekz.

Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA. Ulrich Lins. Rotterdam: UEA, 2008. 126p. 24cm. ISBN 9789290171058. Ilus. Konkiza retrorigardo al la unuaj cent jaroj de UEA. € 15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Vekiĝo de la animoj, La. Animaj kaj spiritaj okazoj en scenaj bildoj. Rudolph Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2008. 118p. 21cm. Daŭrigo al *La gardanto de la sojlo*. € 9,00

Verse reversi. Benoît Philippe. Novjorko: Mondial, 2008. 159p. 22cm. ISBN 9781595690975. „Jen poeto inter du mondoj aŭ du lumoj; inter la tento kaj la streĉo; inter perturbo kaj sereno“ (Jorge Camacho). € 12,00

Bildkarto

Bildkarto Centra Oficejo de UEA. Rotterdam: UEA, 2008. Foto de la CO de UEA. Fotis F.L. Veuthey. € 4,50 (10 ekz.). Triona rabato ekde 30 ekz.

DUMVIVAJ MEMBROJ

Irano: G. Ferdosnia. Japanio: A. Kawakita. Nederlando: J. Kieffe.

PATRONOJ DE TEJO

Japanio: Y. Izumi. Nederlando: J. Butter-Windt.

SOCIETO ZAMENHOF

Belgio: C. Bracke. Brazilo: M. Pozder Almada. Danio: B. Chaterjee, T. Gregers, E. Kehlet. Francio: F. Lo Jacomo. Germanio: M. Stroinski, H. Stroinski, H. Welling. Britio: E.R. Waterworth. Italio: A. D'Ubaldo, S. Stoppoloni. Korea Respubliko: Y. M. Kim. Svedio: G. Olsson. Usono: A. Casey, P. Cook.

DONACOJ

Ĝis la 15-a de septembro 2008

Kapitalo Afriko: Francio: J.-M. Cash 500,00. *Sumo ĉi-jara*: 500,00.

Konto Afriko: Francio: R. Figueira 20,00. Nederlando: G.A.M. van Bergeijk 100,00; C. & R. Bossong 100,00. Svedio: J. Hammarberg 63,75. *Sumo ĉi-jara*: 1383,43.

Fondaĵo Ameriko: Britio: M. Sims 61,35. Kanado: J. Alain, B. Soroushian, C. Zervic – po 12,50; M. Benoit 25,62; J.F. Bouchard 6,25; P. N. Legault 43,75; W. Du Temple 53,13. Meksiko: L. Torres y Torres 18,75. Svedio: J. Hammarberg 31,91. Svislando: F. Randin 18,75. Usono: Dorcas 21,87; G. Wright 15,00. *Sumo ĉi-jara*: 1869,84.

Fondaĵo Azio: Japanio: Y. Aida, A. Aoyama – po 12,06; M. Aihara, T. Lin – po 12,23; S. Aikawa, K. Hirose, T. Huzisima, K. Ijoshi, M. Kobayasi, Y. Sawaya, H. Sugitani – po 13,08; T. Huzita, I. Katoo, M. Nakatu, T. Nomra – po 18,08; S. Micukaŭa 130,75; H. Mijazaki 21,62; T. Saitoo 26,14; K. Sanpei, H. Takahasi, Y. Ueno – po 24,11. Korea Respubliko: J.-T. Bae, G. Bak, S.-H. Bak, C. Chang, M.-J. Cho, E.-S. Choi, Y.-S. Choi, S. Ho, S. Hong,

E.-S. Hwang, S.-T. Im, H.-G. Kang, C.-M. Kim, I.-S. Kim, J.-O. Kim, J.-W. Kim, K.-S. Kim, U.-S. Kim, Y.-O. Kim, Y.-H. Ko, K.-Y. Kong, C.-U. Lee, H.-J. Lee, J.-K. Lee, K.-C. Lee, N.-H. Lee, S.-W. Lee, Y.-W. Lee, C.-H. Lim, Y.-T. Ma, H.-K. Min, J.-J. Min, J.-S. Oh, S.-M. Oh, M.-R. Park, M.-S. Park, J.-Y. Park, Yong-S. Park, Young-S. Park, W.-C. Park, H.-C. Sung, I.-S. Won, S.-J. Yang, Y.-A. Yu 410,00. *Sumo ĉi-jara*: 1892,87.

Novjorka Oficejo: Usono: S. Lawton 12,91. *Sumo ĉi-jara*: 43,72.

Fondaĵo Canuto: Nederlando: A. & H. Bakker 1000,00; R. Moerbeek 75,00; A. Nonima 40,00. *Sumo ĉi-jara*: 4525,46.

Fondaĵo Espero: Japanio: H. Harada 198,20; A. Horiuti 60,06; M. Isaki 120,12; Y. Narita 6,00; N. Simada 30,03. Nederlando: R. Moerbeek 100,00. Usono: M. Rainey 20,00. *Sumo ĉi-jara*: 1040,84.

Fondaĵo Junularo:

Danio: S.D. Hazard 158,39. *Sumo ĉi-jara*: 234,33.

Triamonda Kongresa Fondaĵo:

Nederlando: A. Nonima 20,00. *Sumo ĉi-jara*: 4817,09.

Volontula Fondaĵo:

Francio: L.C. Zaleski-Zamenhof 182,11. Nederlando: A. & H. Bakker 1000,00. *Sumo ĉi-jara*: 1232,11.

Domrenovigo: Nederlando: A. & H. Bakker 2000,00. *Sumo ĉi-jara*: 2020,00.

Konto Hans: Nederlando: A. & H. Bakker 2000,00. *Sumo ĉi-jara*: 2000,00.

Ĝenerala kaso: Francio: Y. Vidal 5,61.

Italio: C. Bourlot 54,00. Nederlando: A. Roode 27,00. Svedio: U. Luin 60,00. Diversaj malgrandaj: 1,01. *Sumo ĉi-jara*: 1471,80.

Al ĉiuj koran dankon! UEA

UEA invitas prelegi en la Bjalistoka IKU-sesio

Dum la 94-a UK en Bjalistoko okazos la 62-a sesio de Internacia Kongresa Universitato.

UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71700 Makabim, Israelo; rete: amri@huji.ac.il, ĝis 2009-01-31.

Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Estos aparte bonvenaj proponoj ligitaj al la

kongresa temo. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo).

La proponoj estos prijuĝataj de la Komisiono pri IKU kaj fine konsiderataj de la Estraro de UEA. La proponintoj estos informitaj pri akcepto aŭ ne-akcepto ĝis 2009-04-15. La sukcesaj kandidatoj devos sendi kompletan tekston de siaj prelegoj al UEA ĝis 2009-05-31.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Prelego estos rekompencita per modesta honorario. Pliaj detaloj kaj antaŭaj IKU-prelegoj kaj resumoj troviĝas en la IKU-paĝo ĉe <http://uea.org/dokumentoj/IKU>.



100 jaroj
universala
esperanto-
asocio

Tra la mondo

Niaj instruistoj konferencis

La unua tutmonda internacia E-aranĝo en Afriko, la 41-a ILEI-Konferenco, okazis en la tagoj 29 jul – 05 aŭg 2008 en Benino, kun 73 aliĝintoj el 16 landoj.

El kvin landoj de Afriko, nome Brundio, Ebura Bordo, Ganao, Togolando kaj Benino (efektivaj partoprenantoj) estis 23, kaj de naŭ eksterafrikaj landoj alvenis 21. Subvencioj de UEA, ILEI kaj kelkaj privataj personoj ebligis partoprenon de afrikanoj, kaj la franca sekcio de ILEI helpis ĉeesti al juna afrikanino per monsumo gajnita en aŭkcio.

En la inaŭguro ĉeestis altrangulo de la urbo Portonovo kaj la unua esperantisto en Benino, Privas Tchikpe, kiu salutante rakontis la historieton pri la movado en la lando. La ĉeestantojn salutis Hori Yasuo, estrarano de UEA, respondeca pri landa kaj regiona agadoj, kaj estis voĉlegitaj mesaĝoj de UEA, ILEI, ISAE kaj AIS.

Programeroj tradiciaj kaj apartaj por afrikaj samideanoj variis dum la konferenco. La antaŭvidita simpozio kun la temo *Pedagogio de Esperanto: Afrikaj spertoj kaj defioj* estis, pro diversaj kialoj, nekompleta, sed parolis Renée Triolle pri la franca instrusistemo kaj Hori Yasuo pri la japana konstitucio. François Lo Jacomo prezentis referaĵon pri la graveco de edukado en la gepatra lingvo, Latifou Gbadamassi la projekton *Mondo-Rondo kiel Esperanto-lanĉilo en la Infana Mondo en la Tria Mondo, ĉefe en Afriko kaj ties realigo en Afriko*. Lingva Festivalo, dum kiu partoprenantoj mem skize prezentas siajn lingvojn kaj la diversecon kaj abundecon de lingvoj kaj kulturoj, okazis kun 15 prezentataj lingvoj, inter kiuj 6 afrikaj regionaj lingvoj kiel la svahila kaj adja. Ekzameno de UEA/ILEI finiĝis sukcese: tri en la meza kaj aliaj tri en la baza nivelo sukcesis, dum ekzameniĝis pli ol dek. Aparta estis la projekto gvidata de Jean-Pierre Boulet *Verkado de libreto cele al edukado en Afriko, ligo al Uneska laboro*. La celo estis verki rakonton por

instigi afrikajn virinojn eviti la morton de infanoj per racia, simpla kaj malmultekosta nutrado. Kelkaj afrikanoj sekve kune verkis rakonton, kiun Jean-Pierre proponis al Unesko por traduko al la franca kaj al la angla. Anna Montesinos per *Lingvaj ludoj por la klasĉambro* prezentis diversajn tipojn de ludoj. Multspecajn instrumaterialojn ŝi kunportis kaj parton de ili ŝi disdonis al afrikaj kolegoj. Renée Triolle, trovinte mankon de sesioj traktantaj la konferencan temon *Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero*, gvidis grupon de afrikanoj kaj kune diskutis pri diversaj problemoj.

Okazis kvar duontagaj ekskursoj al najbaraj vilaĝoj kaj parkoj. La plej ŝatata estis boatvojaĝo al Aguegues, surakva vilaĝo. Tutatagan ekskurson tra Portonovo ĝuis ankaŭ afrikaj samideanoj, kion ebligis monofero de eksterafrikaj partoprenantoj. La ekskursojn aranĝis ĉefe la LKK-ano Sébastien Essou.

Malgraŭ malfacilaĵoj kaŭzitaj ĉefe de lokaj cirkonstancoj, LKK gvidata de J. Charles Alofa bone organizis la konferencon, kaj sen granda problemo ni ĝuis konferencajn tagojn en la Songhai-Centro, kiu estis taŭga kaj agrabla ejo por nia konferenco. La vivkondiĉoj en la centro estis multe pli bonaj ol ni antaŭe timis. Multe helpis japanoj, kiuj faris konferencajn sakoĵn, estrarno de ILEI el Japanio kompilis konferencan libron kaj pretigis nomkartojn, leterfoliojn, kovertojn kaj glumarkojn. Niaj gekolegoj alportis ĉion el Japanio al Roterdamo, kie la materialojn transprenis la itala samideano Marco, por porti ilin ĝis Portonovo. Tio estas bela ekzemplo de kunlaboro inter afrikanoj kaj japanoj.

Multaj afrikaj samideanoj tre bone parolas Esperanton kaj ili estas energiplenaj, entuziasmaj kaj sinceraj por nia movado. Precipe impresa kaj konvinka estis perkompuita prezentado de du burundianoj pri la Esperanto-movado en Burundio.

Inter la partoprenantoj estis kvar lernantoj (15-16 jaraĝaj) el la urbo Lokossa. Ili estas nia „espero“. Mi estus feliĉa se nia partopreno omaĝis kaj kuraĝigis niajn afrikajn samideanojn.

Isikawa Tiekio



Sukcesa somera lernejo kun la unua lernu!-renkontiĝo

Somera Esperanto-Studado (SES) okazis inter la 9-a kaj la 17-a de aŭgusto en la slovaka urbeto Modra-Harmónia, nur 30 km de la ĉefurbo Bratislava. Enkadre de SES oni decidis okazigi la unuan fizikan renkontiĝon de lernu!-uzantoj. Venis 105 personoj el 25 landoj kaj iliaj aĝoj estis tre malsamaj – la plej juna havis nur 3 monatojn kaj la plej aĝa 90 jarojn.



La programo estis plenŝtopita. Dum antaŭtagmezoj oni lernis Esperanton. La instruadon gvidis kvin spertaj E-instruistoj en grupoj laŭ la lingvo-nivelo: Bertilo Wennergren (SE), Birke Dockhorn (DE), Petra Smideliusz (HU), Dalia Pileckienė (LT) kaj Stano Marček (SK). La partoprenantoj diligente vizitis la kursojn kaj la fina enketo montris, ke la lernado estis unu el la plej ŝatataj programeroj. Ĉiuj personoj, kiuj vizitis la kursojn dum la aranĝo, fine ricevis atestilojn pri 26-hora kurso laŭ la niveloj de la referenckadro de A1 ĝis C1.

Tamen plibonigi sian Esperanton oni povis ne nur pere de la kursoj. Tion eblis fari ankaŭ dum la cetera programo, kiu abundis: ludoj, koncertoj, ekskursoj, dancoj, sportoj kaj prelegoj. Oni havis tre bonan okazon tuj surloke praktiki tion, kion oni lernis antaŭtagmeze.

Dum la posttagmezaj programeroj okazis pluraj interesaj prelegoj, kiel ekz. pri la kreado kaj historio de revuo *Esperanto*, pri eksto de lingvo, projektoj de E@I... Kreivaj metiejoj estis ankaŭ ŝatataj kaj vizitataj: pri ornamado de specialaj mielkukoj, pri kaprompiloj, pri muzikinstrumentoj. Oni ŝatis same ekspresajn kursetojn lingvajn: pri la slovaka, pola, ĉina, nederlanda, litova.

El la vesperaj programeroj estis populara ĉefe la nacia vespero, dum kiu oni povis aŭskulti popolajn slovakajn kantojn, ankaŭ en Esperanta interpreto (popola muzika grupo de Petro Sarnovský, iama Kečka) kaj aldone gustumi plurajn vin-specojn de la Modra-regiono, kiu per siaj vinoj estas bone konata en Slovakio. La internacia vespero montris, kiaj talentoj „kaŝiĝas“ en nia E-komunumo – pluraj esperantistoj elpaŝis kun vere profesiaj kontribuoj. Dum aliaj vesperoj oni ĝuis koncerton de Milan Dočekal (el la grupo TEAM), spektaklon de la filmo „Esperanto estas...“ aŭ diskotekon.

Dum la semajno okazis ankaŭ multaj programeroj pri lernu! Pri ĝi zorgis la tuta kerna lernu!-teamo. Eblis ĉeesti plurajn prelegojn pri lernu.net, pri la traduk-sistemo de la paĝaro kaj pri la estonto de la projekto. La teamanoj estis je dispono de la uzantoj dum la tuta semajno, eblis kun ili diskuti, demandi, proponi ion ajn rilate al la paĝaro.

La lernu!-parton de la programo kunfinancis ESF (Esperantic Studies Foundation), kiu ankaŭ finansas kreon kaj funkciadon de www.lernu.net kaj kelkajn aliajn projektojn de E@I.

Pro pozitivaj reagoj de la SES-partoprenintoj oni jam pretiĝas por SES 2009, kiu plej verŝajne okazos semajnon antaŭ IJK, por ebligi tiel al la freŝaj lernintoj utiligi siajn sciojn en la junulara E-aranĝo, kaj konatigi ilin pli profunde kun la E-kulturo kaj movado.

Mallonga video-raporto pri la aranĝo videblas en la retejo de Benio el Irlando, por kiu SES estis la unua E-aranĝo: <http://www.irishpolyglot.com/eo/>. Foto-arkivon de E@I pri la aranĝo eblas trovi ĉe: <http://www.ipernity.com/doc/62903/album>.

Peter Baláž kaj Jevgenij Gaus





Günther Becker (1930-2008), honora prezidanto de TEJO kaj de Sarlanda Esperanto-Ligo, forpasis la 18-an de aŭgusto en Zweibrücken (Germanio). Becker eklernis Esperanton tuj post la 2-a mondmilito. Profesie li estis instruisto ĝis sia pensiigo pro akcidento en 1983. Ekde 1951 Becker aktivis en la Esperanto-movado. Al UEA li aliĝis en 1955. Ekde 1966 li estis dumviva membro kaj, ĝis sia forpaso, delegito en Blieskastel. Li estis prezidanto de TEJO 1956-1964 kaj ĝenerala sekretario de UEA 1964-1974. De 1957 ĝis 1973 li prezidis Sarlandan Esperanto-Ligon. Antaŭ kelkaj jaroj li fondis Becker-Meisberger-Instituton por konservi tion, kion li kreis kun sia edzino Maria (1925-1999), nome belan domon kun ampleksa teknika ekipaĵaro por kapti radio- kaj televidelsendojn el la tuta mondo – li estis fervora amiko kaj diskoniganto de Esperanto-elsendoj – ampleksa biblioteko, riĉa kolekto de la gazetoj, dokumentoj kaj aŭdvidaj materialoj. La instituto celas ankaŭ eldoni literaturon pri lingvaj problemoj en la germana, al kiu Becker mem kontribuis i.a. per la traduko de *L'Espéranto* de Pierre Janton (*Einführung in die Esperantologie*, 1978, 2-a eld. 1993).

Norah Brown (1928-2008) forpasis la 12-an de aŭgusto en Rochdale (Britio). Ŝi estis dum longa tempo unu el la motoroj de Londona E-Klubo,

plenumante plurajn estrarajn funkciojn, i.a. kiel prezidanto, sekretario kaj kasisto.

Karl Buremo (1913-2008) mortis la 27-an de aŭgusto en Jönköping (Svedio). Li aktivis en KELI, i.a. kiel estrarano, kaj iam surbendigis predikojn por la kristanaj E-elsendoj de IBRA kaj HCJB.

Rudolf Kratzmann (1912-2008) mortis la 23-an de marto en Münchsmünster (Germanio). Membro de UEA ekde 1957, li estis delegito 1959-1995.

Valev Kruusalu (1938-2008) mortis la 12-an de junio en Tallinn (Estonio). Li estis longtempa redaktoro de *Informoj de E-Asocio de Estonio*, verkis *Estonoj tra tempoj I-II* (1997-98) kaj tradukis i.a. la romanojn *Laktisto de Mäeküla* de E. Vilde (1983) kaj *Venĝanto de E. Bornhöhe* (1990), kaj la fabelaron *Egemaljuna Eterno* de H. Mänd (1997).



Jean Lehane (1920-2008) mortis la 22-an de aprilo en Toowoomba (Aŭstralio), kie ŝi longe estis delegito. En 1970 ŝi kunfonfis klubon en Toowoomba, kiun ŝi prezidis 1975-1997. Aktiva E-instruistino, ŝi iniciatis la unuan Aŭstralian E-Somerkursaron, kiu okazis en 1977. Aŭstralio E-Asocio distingis ŝin kiel Honoran Fratinon.

René-Jean Marmou (1920-2008), iama misiisto, forpasis en La Houssaye en Brie (Francio). Dumviva memro de UEA, li estis fakdelegito pri katolikismo, ekumenismo kaj abelbredado.



Maire Mullarney (1921-2008) mortis la 18-an de aŭgusto en Dublino (Irlando). Ŝi estis konata kiel edukisto, ĵurnalisto kaj verkisto, kaj kiel kunfondinto de la famioplanada asocio kaj de la verdula movado en Irlando. Mullarney reprezentis Irlandan E-Asocion en la Komitato de UEA 1987-1989 kaj 1999-2001, kaj estis fakdelegito pri ĵurnalismo kaj E-movado. Ŝiaj verkoj *Esperanto for hope* (1989), *Everyone's own language* (1999) kaj *Maire Mullarney argues about Language* (2004) estas vaste aprecataj.

Ivar Nilsson (1921-2008) forpasis la 4-an de aprilo en Umeå (Svedio), kie li estis delegito kaj dum pli ol 30 jaroj prezidanto de la loka klubo.

Draguško Petrov (1924-2008), em. poŝtofiscisto, mortis la 6-an de julio en Sofio (Bulgario). Preskaŭ 40 jarojn li estis la ĉefa funkciulo en Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio: prezidanto de 1972 ĝis 2006, kaj de 2006 ĝis sia forpaso vicprezidanto. Li estis ankaŭ fakdelegito pri telekomunikado.

Mariana Preotu-Maxwell (1950-2008) mortis la 28-an de januaro en Deerfield Beach (Usono). Ŝi partoprenis sesiojn de AIS kaj ĝia filio Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko. En 1995 ŝi migris en Usonon pro edziniĝo kaj tie aktivis en la grupoj de Vaŝingtono kaj Buffalo (Novjorkio).

Franz Richter (1932-2008) mortis la 28-an de julio en Enns (Aŭstrio), kie li estis delegito.

Paroladoj de Ivo Lapenna



sur 5
KD-oj

- 1: *E-o kiel lingva esprimo kaj instrumento de humaneca internacismo* (1987); *Lingva diskriminacio* (1964)
- 2: *100 jaroj de parola E-kulturo* (1987); *Parolado dum la solena inaŭguro de la monumento La Espero en Graz* (1987)
- 3: *Renkonte al la 100-jara Jubileo de E-o* (1981); *La rezolucio de Unesko, Montevideo* (1954)
- 4: *Komunikado kaj homaj rajtoj* (1984); *Kultura valoro de la Internacia Lingvo* (1954)
- 5: *La Jaro de Internacia Kunlaboro – La Jaro de Internacia Lingvo* (1964); *La Internacia Jaro de Edukado* (1970)

Prezo de unu disko: €13,50 (+ imposto en EU 19%; sendokostoj 10%, minimume €4,00). Rabato de 1/6 ekde 3 diskoj (samaj aŭ ne).



Eseoj memore al Ivo Lapenna

Redaktoro: Carlo Minnaja

ESEOJ MEMORE AL IVO LAPENNA

Fascina mozaiko de personaj rememoroj pri la arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA. Kopenhago, 2001. 417p. 25cm. Kun kompaktdisko. Prezo: €45,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

DU BAZAJ LABORILOJ

KONCIZA ETIMOLOGIA VORTARO.

André Cherpillod.

Rotterdam: UEA, 2007 (repr.).

503p. 21cm.

Prezo: €21,60.

La etimologio de pli ol 15000 Esperantaj vortoj, kun komparaj etimoj en pluraj lingvoj.



ETIMOLOGIA VORTARO DE LA PROPRAJ NOMOJ.

André Cherpillod.

Rotterdam: UEA, 2005.

x+227p. 21cm.

Prezo: €19,80.

La etimologio de pli ol 4300 nomoj geografiaj, religiaj, personaj, dinastiaj kaj multaj aliaj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



POPULARSCIENCAJ STAFETAĴOJ

Jen oferto de kelkaj el la daŭre valoraj popularsciencaj verkoj eldonitaj sub la marko Stafeto:

► **ESTIGO DE LA TERO KAJ DE LA HOMO.** Leander Tell. 1971. 124p. 19cm. Ilustrita. Populara skizo pri la esploroj kaj teorioj malantaŭ la hodiaŭa koncepto de evolucio. €1,80.


► **LA BELA SUBTERA MONDO. Libro pri grotoj.** Leander Tell. 1959. 95p. 24cm. Ilustrita per belaj fotoj de naturfenomenoj kaj arheologiaj trovaĵoj en grotoj tra la tuta mondo. €3,00.

► **SENGENAJ DIALOGOJ.** Alberto Fernández. 1971. 197p. 22cm. Ilus. Facilaj klarigoj pri natursciencaj fenomenoj per dialogoj. €6,00.

► **EL LA POLVO DE LA TERO. Enkonduko en la grundosciencan.** William F. Rolt. 1967. 134p. 19cm. Belstila prezento de la ecaro de la grundo, kaj rigardo al ties sekvoj por la nutrado de la homaro. €2,70.

Ĉe la Libroservo de UEA triona rabato por ajna kombino de minimume tri libroj, identaj aŭ ne, sendotaj samtempe al la sama adreso. Tiu ĉi speciala oferto validas ĝis la 31-a de decembro 2008.

EKSKURSO TRA 100 JAROJ



Okaze de la 100-jariĝo de UEA aperis tiu ĉi abunde ilustrita libro de la renoma movada historiisto Ulrich Lins. Ĝi estas intereskapa enkonduko en la historion de UEA kaj kleriga legaĵo por ĉiu esperantisto. Krom ĝenerala historia trarigardo ĝi enhavas artikolojn pri Hector Hodler, la fondinto de

la Asocio, kaj pri Ivo Lapenna, la konstruinto de la moderna UEA. La libron kompletigas laŭjara kroniko, listoj de la prezidantoj, direktoroj kaj redaktoroj, kaj bibliografio.

UTILA ESTAS ALIĜO. Tra la unua jarcento de UEA. Ulrich Lins. Ilus. Rotterdam: UEA 2008. 126p. 24cm. ISBN 978 92 9017 105 8. Prezo: €15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

NEDERLANDA MAJSTRO




Tiu ĉi rakontaro donas bonan bildon pri la verkarto de Louis Couperus (1863-1923), unu el la ĉefaj nederlandaj aŭtoroj. Li kreis mirinde multflankan verkaron. Elstaras en ĝi serio da psikologie-realismaj romanoj pri tiutempe modernaj temoj.

Aliaj verkoj havas kiel fonon la Roman Imperion, precipe en ĝia degenera periodo. Tria tipo estas mitologiaj romanoj, ĝenro, kiun li inventis.

PRI VAGABONDOJ KAJ FRIPONJOJ, PRI DAMOJ KAJ KAVALIROJ. Rakontoj. Louis Couperus. El la nederlanda trad. Gerrit Berveling. Rotterdam: UEA 2008. 184p. 21cm. ISBN 978 92 9017 102 7. Prezo: €9,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

LA KVARTALO DE NIA DOMO



"Mi ĉiam estis scivolema pri la historio de la kvartalo en kiun la hazardo deponis Universalan Esperanto-Asocion. Tiu ĉi eta gvidlibro estas frukto de tiu scivolemo kaj de miaj lastatempaj promenadoj. Ĝi ne celas doni ĉiujn detalojn pri konataj lokoj, sed ĉefe atentigi pri tiuj aferoj, kiujn alikaze la vizitanto

al nia oficejo preteratentus – kaj ĝi celas viviĝi la historion por faciligi la kontakton inter vizitantoj kaj la ĉirkaŭaĵo." (H. Tonkin)

TUJ APUDE. Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA. Humphrey Tonkin en kunlaboro kun P. Bulthuis kaj F. Veuthey. Ilus. Rotterdam: UEA 2008. 56p. 20cm. ISBN 978 92 9017 106 5. Prezo: €7,50. Triona rabato ekde 3 ekz.

POR SUKCESI EN EKZAMENO



INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj de la Internaciaj Ekzamenoj, kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. Taŭgas kaj por memstudado kaj por uzo en kursoj. Tria eldono. Rotterdam: UEA/ILEI, 2008. 39p. ISBN 92 9017 104 1. 21cm. Prezo: €4,50. Triona rabato ekde 3 ekz.

NIA VORTORDO SUB LUPEO



NATURAJ VORTORDOJ EN ESPERANTO. Wim Jansen. Resumo de temoj de doktora disertacio. La verko celas interesitojn pri la gramatiko kaj la funkciado de Esperanto kaj volas helpi al instruistoj, kursestroj kaj verkistoj de lernolibroj. Rotterdam: UEA 2008. 40p. 21cm. ISBN 978 92 9017 103 4. 21cm. Prezo: €4,50. Triona rabato ekde 3 ekz.